







№ 05  
1967

G.L. GHELLI

ITALIA

Organo  
Associazione  
Italiana  
Ferrovieri  
Esperantisti

ferroviario



38-a NACIA KONGRESO DE ESPERANTO - CATANIA (SICILIO)

NACIA KUNVENO DE ITALAJ FERVOJISTOJ

La 38-a Itala Kongreso de Esperanto okazis ĉi jare, de la 16-a ĝis la 22-a de septembro en Catania, unu el la plej belaj urboj de Sicilio, je la piedoj de Etna la plej alta vulkano de Eŭropo.

La novaj kaj malnovaj Esperantistoj renkontiĝis ĉe "Eden Bar", sabaton vespere por teksu novajn interrilatojn.

Dimanĉon la 17-an, post la Diservo celebrita en Esperanto, okazis la sole na inaŭguro de la kongreso en la luksa salonego de E.S.E. (Ente Siciliano Elettricità). Ĉeestis 250 italaj kaj alilandaj Esperantistoj. Multnombraj aŭtoritatuloj, ĉu regionaj ĉu ŝtataj honorigis nian 38-an: Subministro Hon. Giuseppe LUPIS, reprezentis la italan registaron, Deputito Hon. Antonello DATO, la Sicilian regionon, Senatano Mario MARTINEZ, Subministro pri la Komercia Ŝiparo, kune kun la estroj de la Esperanto-movado en Italio: D-ro Stoppoloni, Prezidanto de F.E.I.; D-ro Dazzini, Sekretario de la Internacia Ligo de Instruistoj; Adv. Vaona kaj Prof. Agostini, respektive Prezidanto kaj Ĝenerala Direktoro de Itala Instituto de Esperanto, D-ro Fabris de la Internacia Ligo de Ĵurnalistoj, S-ro Gimelli de la Internacia Fervoĵista Esperanto-Federacio.

Prof. Bruno, Prezidanto de L.K.K. salutis la ĉeestantojn kaj post li, bondeziris la Kongreson la reprezentantoj de eksterlandaj Asocioj (Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio, Francio, Hungario, Jugoslavio, Pollando, Venezuelo, San Marino). Varman saluton de la franca delegacio prezentis S-ro Coyac, kiu alportis ankaŭ tiun de la Francaj Fervoĵistoj-Esperantistoj.

Poste parolis unu post la alia Hon. Lupis, en la nomo de la registaro, Hon. Dato kiu bonvenigis nin en Sicilio, kaj Sen. Martinez kiu, post la vortoj de la reprezentanto de I.F.E.A. kaj de Kolego Coyac, aŭspiciis Esperanto-kursojn, kiel por la fervoĵistoj, ankaŭ por la maristoj, por interrilatigi ilin kun diverslandaj maristoj. La Kongreso malfermiĝis per la vortoj de D-ro U. Stoppoloni, kiu dankis la aŭtoritatulojn, la L.K.K. kaj la ĉeestantojn.

Posttagmeze komenciĝis la kongresaj laboroj kaj okazis la Nacia Kunveno de Itala Fervoĵista Esperanto-Asocio. La nacia sekretario, S-ro Gimelli, raportis pri la agado de la Asocio precipe rilate al partopreno de itala delegacio al Internacia Fervoĵista Kongreso en Fulda. Poste li donis informojn pri la decidoj de la Komitato de I.F.E.F. (faka Asocio de U.E.A.) elekti kiel sidejo de la venontaj kongresoj, Varna (Bulgario) de la 11-a ĝis la 17-a de majo 1968-a, Avignon (1969-a) kaj Bologna (1970-a), invitante la italajn fervoĵistojn partopreni en ili. "Association Européenne des Cheminots" petis por havi geinstruistojn por Esperanto-kursoj, eventuale organizotaj de tiu Asocio, en diversaj italaj urboj. S-ano Gimelli petis la grupestrojn interesiĝi pri tiu grava afero, kaj doni al li la nomojn de la instruistoj pretaĵ doni helpon. Laste la Sekretario raportis pri la evoluo de la peto al Ministro de Transportoj kaj Civila Aviado, por aldono de klarigoj en Esperanto en Itala fervoja horaro. La asembleo decidis sendi al Ministro, Hon. Scalfaro, leteron por memori al li, lian promeson de interesiĝo.

Lundon kaj mardon daŭris la kongres-laboroj kaj la jaraj kunvenoj de la fakaj Asocioj kaj sekvis akcepto ĉe la Urbestro kaj vizito de la urbo per aŭtobuso kun halto en strato Esperanto sub kies tabuleto oni deponis florkronon. Mardon vespere la partoprenantoj ĝuis folkloran spektaklon en Aci-reale: "La malvenko de Roncisvalle" pere de Siciliaj pupoj vestitaj kiel palatenoj de Karlo la Granda. Merkredon matene fermo de la kongres-laboroj.

Merkredon, ĵaŭdon kaj vendredon estis ekskursaj tagoj por konigi al la kongresanoj tiun idilian parton de Sicilio. Do, vizito al Etna aŭtobuse kaj kablovoje ĝis 3000 metroj, ekskurso al Siracusa, al ties greka-romaj restaĵoj, kaj vizito al Taormina; tie akcepto fare de la Urbestro en la fama palaco Corvaia, tagmanĝo en la luksa Hotelo Jolli en paradiza pozicio antaŭ

la maro. Posttagmeze vizito al greka teatro kaj al naturaj belecoj de tiu ĉarma urbeto. Vespere reveno al Catania kaj adiaŭo.

Delvina Gimelli

===== G A Z E T O J R I C E V I T A J =====

- (Estas indikita la lasta numero ricevita) Dua parto
- Aŭstria Esperanto-Revuo = Organo de Aŭstria Esperanto-Asocio. Delonge ni ne ricevis ĝin.
  - Germana Esperanto-Revuo = Oficiala Organo de la Germana Esperanto-Asocio. N-ro 3 Marto 1967 - Dudeka Jarkolekto.
  - Okcidentgermana Revuo = N-ro 3 Majo-Junio 1967 - Sepa Jarkolekto.
  - L'Esperanto = Organo Ufficiale della F.E.I.-Ente Morale- Agosto-Settembre 1967. Anno 45 N° 8-9. Nuova serie N° 116-117.
  - Franca Esperantisto = Oficiala Organo de U.E.F. Delonge ni ne ricevis ĝin.
  - Jugoslavio Esperantisto = Organo de Jugoslavio Esperanto-Ligo. Kiel supre.
  - Pola Esperantisto = Organo de Pola Esperanto-Asocio. Kiel supre.
  - Nuntempa Bulgario = Aperas ĉiumonate en Lingvo Esperanto. N-ro 7 - 1967.
  - Bulgara Esperantisto = Organo de Bulgara Esperantista Asocio. Septembro 1967. N-ro 9. Jaro XXXVI-a.
  - El Popola Ĉinio = Eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo. N-ro 7 (109). 1967.
  - Hungara Vivo = Kvaronjara Revuo de Hungara Esperanto-Asocio. VII-jaro N.3.
  - Homo kaj Kosmo = Populara Naturscienca Esperanto-Revuo. Jaro V-a. N-ro 1 Unua jarkvarono 1967.
  - Interrilata Centro Internacia de la Esperantistaj Kampadistoj = Informa Bulteno. N-ro 35 de Julio 1967.
  - Internacia Bulteno de Muzika Esperanta Ligo = Jaro IV-a, N° 14 - 1967.
  - Notiziario Internazionale = A cura dell'Ufficio Informazioni della F.E.I. Anno XVII n° 7-8 (163) luglio-agosto 1967.
  - Esperanta Parto de la Teozofia Uragvaja Instituto = n-ro 14-a Marto 1967.
  - Paco = Oficiala Organo de la Mondpaca Esperantista Movado = Sveda eldono, XIV-a jaro N-ro 165-166, Aŭgusto-Septembro 1967.
  - Informilo="Amikeco tra la mondo". T.A.N.E.F. (Turista Asocio "La Naturamiko" Esperanto-Fako). Delonge ni ne ricevis ĝin.
  - Ripozoj en Bulgario = Dumonata revuo en Esperanto. 1967 - 2- (N-ro 47).
  - Sennaciulo = Oficiala Organo de Sennacieca Asocio Tutmonda "S.A.T." N-ro 2 (741) Februaro 1967 - 38-a Jaro.
  - Voci della Rotaiia = Revuo de Itala Ŝtata Fervojo. Anno X N°9 Settembre 1967.
  - Por la Paco = Unio de Sovetaj Societoj de Amikeco kaj Kulturaj Ligoj kun eksteraj landoj. VI-a Moskva 1966.
  - Universala Revuo - Legaĵoj por ĉiuj = N-ro 26 (7-a Jaro). Marto 1967.
  - Stelle dell'Orsa = Anno I. Volume I. n-ro 2-3 = 31 gennaio 1967
  - Il Pioniere = Periodico mensile contro l'alcoolismo per l'igiene sociale Settembre 1967 - N°. 9 Anno L.
  - La Informilo = Bulteno de la Orient-franca Federacio aliĝinta al Unuiĝo Franca por Esperanto. N-ro 54 Januaro 1967.
  - Corriere Philips per la famiglia = Edizione giugno 1967.
  - Intersteno = Trimonata organo por enkonduko de simpla skribo: multlingva. n° 44 (78) - julio 1967.
  - Katolika Sento = Bollettino d'informazione ai Soci dell'Unione Esperantisti Cattolici d'Italia = Anno 46 n°. 4 - 5 Luglio-Ottobre 1967.
  - Espera Karitato = Amikoj de Nia Sinjorino de la Vokiĝoj. N-ro 39 Junio 1967.
  - Dissendoj en Esperanto de Radio Roma - Esperanto. Jaro 1967. Nov.Dec.
  - Parolas Radio-Varsovio = Programo de la Elsendoj en Esperanto. Apr-Okt.1967.
  - La Augsburgano-Bulteno kaj Informilo = N-ro 2. Junio 1967.
  - Centro Esperantista Cattolico Romano = N-ro 56 oktobro 1967.
  - Informazioni e Cultura = Circolo Esperantista Alessandria. N°6 Giugno 1967.
  - Centro Esperantista Piceno = Anno V° N° 27 Gennaio-Aprile 1967.
  - Informa Bulteno "Verda Stelo"=Circolo Culturale Esperanto Asti. n-ro 4.
  - Informa Bulteno=Gruppo Esperantista Bolognese "A.Tellini". Luglio 1967.

- Unione Esperantista Genovese - Informilo N°106. Luglio-Agosto-Settembre 1967
- Bollettino de Milana Esperanto-Klubo = Settembre 1967.
- Bollettino del Gruppo Esperantista Torinese "Giorgio Canuto".
- Vercelli Esperantista = Circolare del Gruppo Esperantista Vercellese.

ANNUNCIO IMPORTANTE:

(Fino)

Per aggiornare il nostro schedario preghiamo vivamente chi riceve il presente bollettino come scambio o come omaggio, di volerne confermare il ricevimento ed il gradimento. Chi non gradisce riceverlo é pregato di farlo presente alla redazione: Via Donato Creti, 61 I-40128 BOLOGNA (Italia).

B I B L I O G R A F I O

Prof. Manuel FERNANDEZ MENENDEZ. La homo sur sia vojo, Krestomatia lernolibro Hispana-Esperanto. Eldonas "La bona Semisto" Montevideo (Uragvajo) 1965. Bindita. Paĝoj 376 -- 20x14,5 cm.

NOVAJ TURISTAJ ESPERANTO-BROŝUROJ

- + CSLO - La ĉefurbo de Norvegujo. Eldonita de Turisttrafika Asocio de Oslo kaj Ĉirkaŭaĵoj. Faldfolio kun belaj fotoj.
- + HELSINKI -- Filino de Balta Maro -- Finnlando. Eldonita de Turisma oficejo de la urbo Helsinki. Ampleksa faldfolio kun belegaj koloraj fotoj, mapo de la urbo kaj ĉirkaŭaĵoj.
- + Nordmara banloko LIST SUR SYLT. Faldebla bunta turisma broŝuro kun apartaj klarigoj Esperantlingvaj.
- + Vizitu la Fervojuzeon "N.S.B." -- Hamar, Norvegujo. Faldfolio kun belaj fotoj koloraj kaj mapo de la urbo mem.
- + Vojaĝu kun ĝojo per Norvega Ŝtata Fervojo "N.S.B." -- Eldonita de Norvega Ŝtata Fervojo. Luksa faldfolio kun tre belaj koloraj fotoj kaj mapo de la lando, kun ĉiuj fervojlinioj.
- + 45-a FOIRO DE PADOVA -- Ĉiujara Internavia, 31 majo-13-a junio 1967. Via N.Tommaseo 59 PADOVA (Italujo). Dukolora faldfolio kun fotoj.

D E Z I R A S K O R E S P O N D I

- + Hungara fraŭlino 23-jaraĝa, deziras korespondi esperantlingve kun itala fraŭlo 25-28 jaraĝa: Agnes CSOMBAI, Széchenyi tér 8 SZEGED (Hungario).
- + Argentina fraŭlo 24-jaraĝa, deziras korespondi kun gejunuloj el la tuta mondo pri diversaj temoj kaj interŝanĝo de revuoj kaj bildkartoj.: S-ro Elbio José SARMIENTO, 12 de Infanteria 163 SANTA FE (Argentino).

NEKROLOGO = NIAJ MORTINTOJ

La 23-an de aŭgusto 1967-a forpasis, en la aĝo de 74 jaroj, nia kara amiko Geom. Mario C O P E L L I el Torino longjara fidela membro de nia Asocio kaj fervora propagandisto de nia lingvo kaj movado en ĉiuj medioj.

P O E Z I O J

La mondfama esperanto verkisto kaj poeto Reto Rossetti, vojaĝante kiel pasaĝero en la trajno kie deĵoris nia brita amiko Frank Easton, verkis tiun ĉi poemon, kiel danko pro taso da teo donita al li:

Por amiko Frank Easton de Reto Rossetti

Samideana konduktor'	Amiko, pro la bona pen',
Min gvidis en kupeon	La simpat' sen limo,
Kaj poste kun amika kor'	Mi povas rekompenci, jen,
Regalis al mi teon.	Nur per mizera rimo!
La verda koro batas ja	Kaj, ĉar la trajno taŭgas tre,
En ĉiu vivofako:	Al mi la mano tremas;
Nun hela ĝi radias tra	Do estas tre kredeble, ke
La konduktora jako!	nenion vi komprenos!
Nu, se la skribo ĝenas tro,	
Vi tuj akiros pacon,	
Turnanta - admiru do	
La Trafalgaran Placon!	

N I A J K U N V E N O J

PORRETTA TERME (Bologna): La 29-an de oktobro 1967-a, organizita de la loka "Dopolavoro Ferroviario", okazos en Porretta Terme, la disdonado de la diplomoj de la pasintjara Esperanto-kurso kaj la inaŭguro de novaj kursoj. Ĉeestos la Prezidanto de la F.E.I., D-ro Umberto Stoppoloni.

BOLOGNA: La 4/5-an de novembro 1967-a, okazos en Bologna la disdono de la diplomoj de la pasintjaraj Esperanto-kursoj kaj prelego de Prof. Agostini por propagandi la novajn kursojn starigotajn de Bologna Katedro de I.I.E. kaj Esperanto-Grupo "A.Tellini".

Organizitaj de nia Asocio Kunlabore kun "Dopolavoro Ferroviario", komencos la 21-an de novembro 1967-a Esperanto-kursoj, elementa kaj duagrada por fervojistoj kaj gefamilianoj.

RIMINI (Forlì): Dum novembro la "Centro Esperantista Riminese", organizos publikan manifestacion por memori nian Majstron D-ro L.L.Zamenhof okaze de la 50-o de Lia morto.

SANT'ARCANGELO (Forlì): La 12-an de novembro 1967-a, okaze de ĉiujara loka foiro kaj solenaĵo pri Sankta Marteno, Esperantistoj de Bologna renkontiĝos en "Sant'Arcangelo di Romagna" kun Esperantistoj lokaj kaj de ĉirkaŭaĵo. La tradicia renkontiĝo grupigos nunjare ankaŭ gesamideanojn de aliaj urboj de la Regiono Emilia-Romagna. Do, okazos la "1-a Interregiona Renkontiĝo de Sant Arcangelo di Romagna".

E S P E R A N T O E N L A R A D I O

RADIO ROMA - ESPERANTO - Casella postale 320 I-00100-ROMA (Italia)-JARO 1967-a  
La dissendoj okazas de h.21,00 ĝis h.21,20 (M.E.T.). Ondlongoj: metroj 25,42= kHz 11.800, metroj 30,90=kHz 9.710 kaj metroj 41,24=kHz 7.270.

La dua parto de ĉiu dissendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto"; la unua parto al la ĉi-subaj temoj.

OKTOBRO 1967-a: 2120 dimanĉon la 1-an: 38-a Itala Esperanto-Kongreso

2121 dimanĉon la 8-an: La itala verkisto Luigi Pirandello

2122 " 15-an: Laŭlonge de la rivero Mincio

2123 " 22-an: La itala pentristo Masaccio

2124 " 29-an: Kristana mondo.

NOVEMBRO 1967-a: 2125 dimanĉon la 5-an: Tra la literaturo

2126 dimanĉon la 12-an: Novaĵoj el Italujo

2127 " 19-an: Italaj kanzonoj en Esperanto

2128 " 26-an: Leterkesto.

DECEMBRO 1967-a: 2129 dimanĉon la 3-an: La itala poeto Pietro Metastasio

2130 dimanĉon la 10-an: Montecatini, la urbo de la 39-a Itala E-Kongreso

2131 " 17-an: La itala pentristo Amedeo Modigliani

2132 " 24-an: La kristnaska poezio de S. Alfonso de' Liguori

2133 " 31-an: Kristana mondo.

RADIO ROMA - Esperanto-Fako. Redaktoro: Luigi MINNAJA